n-ro 83

januaro 2004

# La Merkato

ISSN 0941-9306

**IKEF en 2004**

En ĉi tiu La Merkato vi i.a. legos pri du projektoj realigotaj dum 2004:

- Nia ĉina peranto, s-ro Wang, organizos antaŭkongresan vojaĝon tra Ĉinio por IKEF-membroj. La provizora programo aperas sur paĝo 11. Se vi interesiĝas kaj deziras la detalajn informojn (i.a. prezon), tuj skribu al informo(a)komerco.com; rigardu ankaŭ la plej aktualajn informojn je http://users.pandora.be/ikef/lm83-vojago.doc.
- Ekas la preparaj laboroj por terminara projekto surbaze de la Eurodicautom-terminoj kiujn tradukservoj de EU antaŭ du jaroj disponigis al IKEF.

Jen bonaj kialoj por tuj pagi vian IKEF-kotizon por la novaj jaro! La kelkaj membroj kiuj ankoraŭ ne pagis por la jaro 2003 (rigardu sur la adresetikedo) estas invitataj samtempe pagi por 2003 kaj 2004. Kompreneble, oni rajtas antaŭpagi por pluraj jaroj.

Roland Rotsaert, kasisto de IKEF

**Enhavo**

Novjara saluto de la prezidanto . . . . . 3
Nova terminologia projekto planita . . . . . 4
Peranto por Brazilo kandidatiĝas . . . . . 6
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . 7
Interreto . . . . . 8
AIS - Universitata Projekto Komarno . . . . . 9
Vojaĝo al Ĉinio . . . . . 11

**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef BRAUN, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; S-ro Silvio KNIESS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert(a)pandora.be.

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

**Kontoj**:
- ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

**Perantoj**

*Internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), telefono +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, retpoŝto istvan.gether(a)office.ksh.hu

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)



*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org, www.ikef.info aŭ www.ikef.net

## Novjara saluto de la prezidanto

Karaj membroj de IKEF,

Nova jaro staras antaŭ ni. Ĝi alportas novajn taskojn kaj novajn ŝancojn por nia fakgrupo. Ni energie kaptu ilin, favore al niaj laŭstatutaj celoj, nome akceptigi kaj disvastigi Esperanton en komerco kaj ekonomio!

Ni ĉiuj travivas dum la lastaj jaroj gravajn ŝanĝojn de niaj laborstrukturoj. Kiam IKEF fondiĝis en 1985, ankoraŭ staris la murego en Berlino, simbolo de la mondodivido en du grandaj ideologie kontraŭaj politikaj grupoj: „okcidento" kaj „oriento", kapitalismo kaj socialismo. Neniu pensis pri iu interreto. Hodiaŭ, per la falo de la Berlina murego ni "gajnis" la tutmondiĝon de la ekonomio, kaj la informfluo okazas jam grandparte pere de la INTERNET.

Por Esperanto kaj por IKEF tiu nova situacio ofertas grandajn ŝancojn. Per la reto kaj per la elektronika poŝto ni povas komuniki rapide kaj malmultekoste. Sed same kiel UEA, ankaŭ IKEF devas konstati, ke la esperantistoj ne tiom fidele kiel antaŭe membras en iu asocio; ŝajne sufiĉas por multaj, ke ili povas rete komuniki. Do ankaŭ nia fakgrupo perdis membrojn. El tio sekvas, ke IKEF devas pripensi kaj adapti siajn labor- kaj agad-strukturojn. Tion la estraro en la nova jaro energie pritraktos. Ni volas enplekti niajn membrojn en tiun procezon kaj petas vian kunlaboron.

La estraro – laŭ propono de nia ĉina estrarano kaj peranto WANG Tianyi – decidis specialan aranĝon okaze de la ĉi-jara Universala Kongreso en Pekino: unusemajna antaŭkongresa vojaĝo tra Ĉinio. Ĉe tio ni vizitos allogajn komercajn kaj turismajn celojn sub gvidado de ĉinaj IKEF-membroj. Legu pri tio sur paĝo 11, kaj baldaŭ decidu pri via partopreno.

Fine, ni deziras al niaj membroj, simpatiantoj kaj legantoj de "La Merkato",

Feliĉan kaj prosperan jaron 2004
kaj sukceson en viaj agadoj por kaj pere de Esperanto!

Ni ĝojus renkontiĝi kun vi en iuj aranĝoj de IKEF, ekzemple dum la 89a Universala Kongreso en Pekino, Ĉinio.

Por la Estraro de IKEF — Franz Josef Braun, prezidanto



**Nova terminologia projekto planita**

*Antaŭ du jaroj, reprezentantoj de IKEF vizitis la tradukservon de Eŭropa Unio en Luksemburgo. Je tiu okazo estis akirita la rajto prilabori plurmilojn da terminoj el la datumbanko Eurodicautom. Pro manko de homfortoj kaj pro aliaj eldonoj, la projekto dormetis.*

*Temas pri pr. 5000 terminoj, el 11 lingvoj. La ideo estas esperantigi ilin kaj el tio krei novan ekonomian terminaron (ne en formo de libro sed elektronike).*

*Ulrich Fellmann (Ulrich.Fellmann(a)t-online.de), kiu havas konsiderindajn spertojn pri aliaj terminikaj projektoj, pristudis la aferon kaj sendis la sekvantajn proponojn kaj demandojn. Reagoj de legantoj de La Merkato estas bonvenaj.*

1. Miaopinie estas bone labori surbaze de XML-aj dosieroj. Kaŭzo estas la sekvaj avantaĝoj:
a) XML funkcias sur ĉiuj komputiloj (Intel/Vindozo, Apple/MacOS X, Intel-/Linukso, PPC/Uniksoj ktp.)
b) Uzeblas multaj tekstprilaboriloj kaj "editoroj", oni ne estas limigita al certa softvaro.
c) Uzeblas XML-prilaborilo por labori pli konvene.
d) Ĉiu retkrozilo ("browser") povas montri la strukturon kun apliko de koloroj laŭ la strukturo.
e) Eblas transformi/eksporti la dosiero(j)n al kreota datumbanko.
f) Ekzistas multaj retpaĝoj kaj malmultekostaj libroj pri XML (mi proponas la koncizan de la eldonejo O'Reilly. Ekzistas en la lingvoj angla, germana, nederlanda, ktp. kaj kostas ĉ. 8 eŭrojn).

Ekzistas la jena malavantaĝo: oni devas iomete alkutimiĝi al la XML-sintakso.

2. Por eklabori ni devas difini certan strukturon por la XML-dosieroj. Mi faris ideo-skizon (vidu http://users.pandora.be/ikef/eurodic.xml). Bv. diri vian opinion pri tiu strukturo. Mi proponus difini ankaŭ DTD-dokumenton por garantii kaj faciligi la kongruon de la entajpitaĵoj al la difinita strukturo.

3. Mia ideo estas, ke ni laboru laŭ signifoj, ne laŭ terminoj. Ĉiu XML-dosiero traktu unu signifon. Do, la sama vorto povas aperi en pluraj dosieroj, kiuj tamen traktas malsamajn signifojn. En datumbanka lingvo, ĉiuj dosieroj prezentu unu

eron de la ĉefa tabelo de la datumbanko kaj tiu tabelo estu la signifotabelo (nocio-tabelo). La nomo de ĉiu dosiero prezentu la tabelan primaran (unuecan) ŝlosilon.

4. Ni devas decidi pri la jenaj demandoj:

4.1 Ĉu plaĉas al vi la ideo 1 dosiero = 1 unito = 1 signifo (nocio)?

4.2 Ĉu ni indiku la fontojn por vortformo aŭ por tradukparo (vorto de lingvo 1 kaj vorto de lingvo 2)?

4.3 Ĉu ni entajpu rekte en la kodigo UTF-8 aŭ ĉu ni uzu la anstataŭigajn kodigojn kiel
a) la sesdecimala kodo, ekzemple "&#xA9" por la kopirajto-signo
b) la mll. kodo, ekz-e "ŝ" por la esperanta s + ĉapelo.
Mi proponas rekte uzi UTF-8. Tamen, por trakti la dosierojn oni devas certigi, ke la "editoro", tekstoprilaborilo aŭ XML-prilaborilo "komprenas" UTF-8 por ke oni povu entajpi la literojn de ĉiuj uzataj lingvoj, ekzemple esperantaj kaj germanaj. En la dosiero je http://users.pandora.be/ikef/eurodic.xml vi devas vidi la esperantajn literojn j + ĉapelo kaj g + ĉapelo kaj la germanan a + diareso.

4.4 Kiuj aliaj indikoj estu en la strukturo?
Ekzemple: <komento persono="BRJ"> ... </komento>

4.5 Ĉu ni mallongigu nomojn ("BRJ") aŭ skribu la plenajn formojn ("Braun Josef") aŭ uzu la kvarliteran UEA-kodon?

4.6 Ĉu ni uzu nomspacon? En la ekzempla dosiero mi uzis la nomspacon "IKEF:".
Avantaĝo: Oni povas poste miksi kun aliaj dosieroj el aliaj fontoj kaj ni identigas niajn dosierojn.
Malavantaĝo: Pli da uzata spaco/grando de dosieroj.

4.7 Kiel aspektu la unueca ŝlosilo, t.e. la dosieronomo? (Kp. 4.12) Ekzemple:

a) IKEF_VORTO_000001.xml, IKEF_VORTO_000002.xml ktp. aŭ
b) IKEF_domo.xml, IKEF_floro.xml ktp. aŭ
c) IKEF_domo_000001.xml, IKEF_floro_000002.xml ktp.

4.8 Kiel funkciu la interŝanĝo de la dosieroj? Ĉu ekzistu ĉiam nur unu versio, kiu



cirkulu inter la personoj, aŭ ĉu oni laboru paralele kaj de fojo al fojo kunmetu?

4.9 Ĉu ni protokolu nian laboron, do indiku la ŝanĝojn kiujn ni faris ĉe ĉiu dosiero? (Tio povas okazi je la fino de ĉiu dosiero en difinenda maniero)

4.10 Ĉu ni difinu dekomence DTD-dosieron aŭ ĉu ni eksperimentu kun la strukturo ĝis ni decidos pri taŭga strukturo?

4.11 Ĉu ni difinu stildosieron?

4.12 Kiel ni administraciu la kreon de novaj dosieronomoj (numeroj aŭ nomoj) por eviti koliziojn? (Kp. 4.7)

*Informoj pri simila projekto estas je*
*http://users.pandora.be/ikef/manlibro-revuloj.html kaj*
*http://www.uni-leipzig.de/esperanto/voko/revo/.*
*Kiel redaktilo eblas UniRed http://www.esperanto.mv.ru/UniRed/UTF8/index.html.*

## Peranto por Brazilo kandidatiĝas

Nia membro Sílvio KNIESS MATES proponis sin kiel IKEF-peranton por Brazilo. Laŭ nia regularo por perantoj, la Prezidanto kaj la Financa Konsilanto jam nomumis lin, sed tiu nomumo iĝas nur definitiva, se neniu membro malaprobas ĝin ene de 3 monatoj post apero, t.e. ĝis fino de marto 2004, per anonco al la Prezidanto. Jen lia sinprezento:

Denaska lingvo: portugala; esperantisto ekde 1984
Profesio: negoca administranto kun specialiĝo en internacia komerco
Vicprezidanto de EASC - Esperanto Asocio de Santa Catarina (sudbrazila ŝtato)
Esperanto-instruisto laŭ Cseh-metodo ekde la jaro 1992

Agadoj por Esperanto:
1. Instruas Esperanton en loka institucio kaj vicprezidantas ŝtatan E-asocion.
2. Softvaro "Siscobras"
Disvolvas softvaron por mezgrandaj kaj malgrandaj brazilaj eksportantoj. Eblos fari dokumentojn en 16 lingvoj, inter kiuj Esperanto. Estontece, se la softvaro sukcesos, ĉiuj brazilaj eksportantoj scios ke Esperanto kunlaboris al tio. Oni

parolos pri Esperanto en komerca ttt-paĝo de la firmao.

Agadoj por IKEF
Mi agis kiel gvidanto kaj interpretisto en Fortaleza dum la IKEF-vizito ĉe SEBRAE/CE en 2002. Krome, IKEF agis por mi, pere de la helpo de kelkaj IKEF-anoj je kelkaj tradukoj.



## Komercaj petoj kaj proponoj

**Brazilo**

Mário Fonseca, Caixa Postal 10822, 70324-980 Brasilia - SCS - DF, anoncas aktualan retadreson paradizo(a)novamondo.net kaj TTT-ejon: www.NovaMondo.Net (ankoraŭ nur portugale).

**Ĉinio**

Yantai-a Verd-stela Arta Kompanio Limigita, registrita ĉe la Internacia Industria kaj Komerca Administra Buroo, estis fondita je la jaro 1996.

Nia kompanio ĉefe produktas kudra-pintajn kovrilojn de sofo kaj seĝo. La kompanio estas unu el la plej grandaj fabrikoj kiuj eksportas la sofarojn; estas ankaŭ fabriko kiu produktas la plej multe da sofaroj kun eta pinto en Ĉinio. Ni iutempe ankaŭ komercas je aliaj kudra-pintaj produktaĵoj kaj brodaĵoj, ekzemple: tablo-brodaĵoj, tapiŝoj ktp. Ĉiuj el niaj produktaĵoj estas eksportataj al fremdlandoj, ekzemple: Egipto, Saŭdi-Arabio, Unuiĝintaj Arabaj Emirejoj, ktp.

Nia kompanio situas en kvartalo de la urbo Yantai, kiu najbariĝas ĉe Bohai-maro kaj posedas avantaĝan geografian pozicion. La haveno de Yantai havas liniojn al multe da landoj kaj regionoj; la flughaveno estas facila al la grandaj urboj en nia lando. Ni varme invitas geamikojn en- kaj eksterlandajn viziti nian kompanion por negoco, kunlaboro kaj amikaj rilatoj.

Direktoro: Wang Cheng-zhi; Yantai-a Verd-stela Arta Kompanio Limigita, No.89-5-1 Huanshan-strato, Yantai, Ĉinio; rete: greenstar(a)163169.net, telefone: 0086-535-6605088 kaj 0086-535-6170665; fakse:0086-535- 6605088

**Togolando**

Nun komerci kun Afriko estas ebla! Ni estas togolandaj esperantistaj komercistoj legale bazitaj en la haveno de Lomé, la ĉefurbo de Togolando. Ni vendas artikolojn senditajn de Eŭropo (veturiloj, kamionoj, radioriceviloj, komputiloj, televidoj, man-telefonoj, ktp.) Kontaktu nin, ni diskutu pri la kondiĉoj. Alves Klement, rete expedition017(a)yahoo.com, Lomé, TOGO

**Interreto**

IKEF rezervis 'ikef.info' kaj 'ikef.net'

Ekde nun, la IKEF-retpaĝoj estas alireblaj ne nur per la adreso www.ikef.org, sed ankaŭ per www.ikef.info kaj www.ikef.net. Tiel la nomo iĝos pli konata kaj la alirebleco pli fidinda.

Jura diskutlisto

Estis fondita diskutlisto por juristoj "per-esperanto-juro" ĉe Yahoogroups. La listo celas esti komuna forumo, helpilo, interŝanĝilo de esperantistaj juristoj. Vi povas aliĝi sendante mesaĝon al per-esperanto-juro-subscribe(a)yahoogroups.com. Informoj pri juraj kaj juristaj aferoj troviĝas en la reto en la retpaĝaro de Esperanta Jura Asocio (EJA) ĉe: http://es.geocities.com/ejaaeu/index.htm. (LY)

Terminologia Esperanto-Centro (TEC)

Laŭ iniciato de brazilano Lucas Yassumura, rete luko(a)ameriko.org, estis kreita Yahoo-dissendolisto terminologio(a)yahoogroups.com, kiu funkcias kiel TEC-bulteno.

Aliaj komercaj diskutlistoj kaj retpaĝoj

per-esperanto-internacia-komerco(a)yahoogroups.com.br : internacia komerco per Esperanto
per-esperanto-komerco-informoj(a)yahoogroups.com.br : teorio kaj informoj pri internacia komerco
www.esperantujo.net : hejmpaĝo por aziaj komercistoj
www.gxangalo.com : pluraj rubrikoj i.a. pri komerco kaj ekonomio

Komisiito pri trompoj

Esperanto-Federacio en Niĝerio, EFEN, starigis komisiiton por okupiĝi pri Esperanto-trompoj venintaj el Niĝerio. Esperantistoj el Niĝerio petas ĉiujn, kiuj estis, estas aŭ estos trompitaj, turni sin al Oladipo Emmanuel Olusegun, rete:

seglad2002(a)yahoo.com (laŭ esper-inform kaj ret-info)



**Invito al kunlaboro kun AIS en la universitata projekto 'Komarno'**

La Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino startis fine de septembro 2003 en la ŝtata universitato Lucian Blaga Sibiu-Hermannstadt (ULBS Rumanio) internacian fakultat-departementon, kies du instrulingvoj komprenendaj (ne nepre parolendaj) de ĉiuj (jam ĉ. 100) studentoj estas (1) Esperanto kaj (2) la germana.

Venontjare AIS startos kiel partnera universitato (interŝanĝonta docentojn kaj studentojn kun ULBS) en la dulingva (slovaka kaj hungara) landlima urbo Komarno ĉe la Danubo neŝtatan "Liberan Eŭropian Universitaton", laborantan en Esperanto kaj la germana sub rektora triopo (nobelpremiito R. Selten, prezidantino de AIS Slovakio E. Polakova kaj mi mem kiel reelektita AIS-prezidanto) en propra Akademidomo ĉijare ekkonstruota ĉe la centra "Eŭropa Placo" (turistatrakcio!).

Ĉi tiu Akademidomo enhavos 13 studiojn (unu- aŭ duĉambrajn apartementojn), kiuj estas aĉeteblaj private aŭ kolektive. La posedontoj krome kunposedos (kiel akciuloj kaj eventuale regulaj aŭ gastaj docentoj) la universitaton. La unuopaj akcioj kostos ĉ. 250 eŭrojn, la 6 plej malmultekostaj studioj po ĉ. 18.000 eŭrojn. La akcioj, komence ligitaj al studio, estos post la finkonstruo de la Akademidomo (februaro 2005) dise vendeblaj.

Ekde januaro 2004 kreskos la prezoj de studioj kaj akcioj (i.a. pro drasta plialtigo de la plivalora imposto en Slovakio kaj pro la alproksimiĝo de la EU-aliĝo de Slovakio kaj Hungario). Ajnkvanta (preskaŭ senriska) financa engaĝiĝo ne nur havigos influon al la laboro - kaj ŝancon profiti materie - de la Libera Eŭropia Universitato Komarno - ĝi ankaŭ akceleros la enfiltriĝon de la principduopo de AIS (kaj de Eŭropa Klubo) pri dulingveco demokrata kaj kognitiva en universitatajn sferojn.

Mi scias, ke apenaŭ iu faka asocio havas mem sufiĉe da mono por engaĝiĝi en la starigata Libera Eŭropia Universitato Komarno per aĉeto de unu el la 13 studioj en la Akademidomo (kvankam iliaj netaj kostoj varias - laŭ la grandeco - nur inter 18.000 kaj 40.000 eŭroj - la fondo-akcioj ligitaj al la studioj ja estas dise pluvendeblaj, do ne inkluzivendaj en la netajn kostojn). Sed: se via asocio havas almenaŭ dekon da membroj, tiam ja eblas, ke unu, du aŭ tri el ili povas kaj emas akiri kiel posedanto la apartamenton, aliaj membroj partoprenos per akcioj (po 250 eŭroj) kaj via asocio rolos nur kiel peranto, eventuale kiel kunordiganto de pluraj uzantoj, kaj tiukaze eble ankaŭ kiel administranto. Ankaŭ tiel via asocio havus adreson (kaj

piedon) en la Akademidomo. Se via asocio havas jure memstaran personecon, konsideras eventuale kunlabori en nia nun fondata universitato kaj tial interesiĝas esti daŭre informata pri planoj kaj progresoj, sufiĉas eniri per akiro de eĉ nur unu akcio en la rondon de la akciuloj, kiuj kunposedas la universitaton sen la studioj.

Ne hezitu informi nin pri viaj inklinoj rilate nian projekton. Detalojn sciigas laŭpete per retpoŝto el Komarno kolegino Oprof. Dr. habil. Eva Polakova, epolakova(a)ukf.sk aŭ el Paderborn mi mem.

H. Frank, hfr(a)uni-paderborn.de

**Televido**

Mi informas, ke la unua programo de la serio "Ekonomia Esperantismo" estis ekproduktita. Temas pri serio da 18 programoj, 10 minutojn longaj, pri la diversaj aspektoj de la intraesperanta ekonomio (instruado, eldonado, aŭdvida industrio, internacia komerco, komunikado, ktp.)

La programoj estos produktitaj kaj de 3i - Instituto de Internacia Interŝanĝo kaj de Planeda Unuiĝo (NRO kiu havas la rimedojn por produkti kaj dissendi la programojn). 3i zorgos pri la enhavo.

Ni dum 25 minutoj intervjuis la lingvo-instruiston (angla kaj Esperanto) Devanízio Apolinário, pri la instruado de Esperanto en la kunteksto de la intraesperanta ekonomio. Post polurado, la programo reduktiĝos al nur 10 minutoj.

Fabrício Valle - fabriciovalle(a)redeesperanto.org.br

**Bartera komerco**

En nuntempa komerco estas kutimo ke la liverata varo estas pagata per mono. Tamen, ankoraŭ okazas ke iu varo (ekzemple maŝino) estas interŝanĝata kontraŭ alia varo (ekzemple kvanto da ligno aŭ erco). Tion oni en angla lingvo nomas ‘barter'. Ofte malfacilas trovi partnerojn por tia komerco. Tial ekestis kelkaj borsoj kiuj kunigas postuladon kaj proponadon. Ili ankaŭ funkcias interrete. Ekzemploj estas www.ebanctrade.com kaj www.res.be. (rr)

**Foira kolekto**



Rilatojn inter Esperanto kaj komercaj foiroj en Francio, Germanio kaj aliloke (dokumentojn, reklamojn, menukartojn... tiurilatajn) kolektas Rolf BEAU, Eier Kirchweg 18, DE-27333 SCHWERINGEN, retadreso robo.espero(a)t-online.de. (lg)

## Vojaĝo de IKEF-delegacio antaŭ la 89a UK 2004

Rim.: La programo centriĝas ĉinan amplekson plej moderna Shanghai, plej antikva Xi'an, plej bela ĝardeno sudĉina Suzhou, plej bela maro nordĉina Qingdao; kaj religiaj aspektoj budhisma kaj islama en Xi'an, kristana kaj taoisma en Qingdao; kaj aktuala vivo de aziaj IKEF-anoj en Shanghai, Kunshan, Suzhou, Xi'an kaj Qingdao…

| Dato | Urbo | Trafiko | Horaro | Programo | Hotelo |
|---|---|---|---|---|---|
| Tago 1 16.07. | Shanghai | | a.tagmeze | kunsido en oficejo de dumviva membro Zheng kun lokaj IKEF-anoj kaj E-komercistoj por sinprezentado | 3-stela |
| | | propra buso | p.tagmeze | visito: Pudong-Ekspluata Kvartalo, kie plej modernaj konstruaĵoj tra mondo | |
| | | propra buso | vespere | promeni sur Nanking-strato, komerca simbolo de Shanghai kaj ĉe Yangzi-Rivero, lift-grimpi TV-turon Oriento por rigardi la noktan panoramon de Shanghai | |
| Tago 2 17.07 | Kunshan | propra buso | a.tagmeze | de Shanghai survoje viziti fabrikon de japana IKEF-ano Miyoshi, kiu konigu spertojn pri ĉina investo | sama hotelo |
| | Suzhou | propra buso | p.tagmeze | viziti plej ĉinstilan ĝardenon antikvan, kaj mondfaman industrian kvartalon kun korea kaj singapura usino konduke de korea kaj ĉina E-komercistoj | |
| | Shanghai | propra buso | vespere | reveni al Shanghai | |
| Tago 3 18.07. | Shanghai<br>Xi'an | propra buso<br>aeroplano | 09:00<br>11:30<br>p.tagmeze | magneta vagonaro al flughaveno<br>ĝis Xi'an; tranigardi antikvan urbon, viziti Terakotan Armeon kaj Huaqing-Palacon | 3-stela |
| Tago 4 19.07. | Xi'an | propra buso | a.tagmeze | maŭzoleojn Maoling memore venki la hunon, Qianling memore venki turkon | sama hotelo |
| | | | p.tagmeze | ŝtona stelaro kun kristana memor-ŝtono al unuj jaroj en Ĉinio, antikva moskeo… | |
| | | | vespere | antikva danc-opero | |
| Tago 5 20.07. | Xi'an<br>Qingdao | propra buso<br>aeroplano | a.tagmeze<br>p.tagmeze<br>vespere | ekonomi-komerca universitato<br>antikva pagodo kaj historia muzeo<br>ĝis Qingdao | |
| Tago 6 21.07. | Qingdao | propra buso | a.tagmeze<br>p.tagmeze | tranigardi pejzaĝojn eŭropstilajn<br>viziti Qingdao-Bierfarejon kaj fabrikejon de korea E-entreprenisto | |
| | | | vespere | promeni ĉe maro kaj tie strando | |
| Tago 7 22.07. | Qingdao | propra buso<br>vagonaro | a.tagmeze<br>nokte | viziti Laoshan-monton kun taoisma [illegible]<br>per kuŝvagono veturi al Pekino | |
| Tago 8 23.07. | Pekino | propra buso | matene | ĝis kongresejo | |